

Joseph Döpjohann,

La vivopado

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kuradon lernas la infano
gvidate zorge de l' patrin',
mallerte metas la piedojn
kaj ofte ŝton' faligas ĝin.

Grandiĝinte vian vojon
serĉas vi prefere mem,
ŝtonojn ne timante iras
viajn vojojn kun riskem'.

Je la fin' de via vojo,
kiam malfortiĝas vi,
prenos iu vin ĉemane,
vin kondukos tiu ĉi.

Sed ĉiam pensu dum la vojo,
en ĉiu tag', en ĉiu hor',
starante firme aŭ falante,
vin ĉiam tenas la Sinjor'!

*Traduko de la Basgermana poemo "De Liäbenspatt" de JOSEPH DÖPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-05-04.*

MR-419-1 / Arg-255-517 (2004-07-02 14:30:51)

Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Döpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.